

# FABELOJ

STEFANO GULYAS
Del. de UEA

# FABELOJ

ORIGINALAĴO

DE

FRANJO MODRIJAN

STEFANO GULYÁS
Del. de UEA.
Kosztolányi D. str. 69.
Pestszentlőrinc
Hungarujo.

ESPERO KATOLIKA

22, Cours Albert Ier, PARIS-VIII

1225 I

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL

dod. do V-14621

# FABELOJ

Originalaĵo de Franjo MODRIJAN

## I. — *Judito dormas.*

La brulruĝa luno naĝas sur la ĉiela maro kiel purpura ŝipo, glitante tra la trembriletantaj, nenombreblaj steloj kaj steletoj. La mistera reĝino de l' nokto, de la sonĝoj kaj fabeloj, veturas ĉirkaŭen por feliĉigi la homaron per dolĉa ripozo. Enrigardante la fenestrojn, ŝi salutas siajn dormantajn gekarulojn.

Judito dormas en sia lito. Ŝi sonĝas, la senkulpa, dektrijara knabino, kun ĉarma rideto sur la etaj lipoj. Ŝiaj pensoj estas tre okupataj per belegaj fabeloj. Ŝi estis finleginta la lastan fabelon el sia riĉe ilustrita fabellibro kaj nun ŝi ekdormis...

Ŝia libro kuŝas trankvile sur sia loko en granda ŝranko kaj dormas. Jes, ĝi

dormas, sed ĝia internaĵo pli kaj pli vigliĝas; ĉiuj literoj moviĝas, viviĝas...

La unua mallaŭte ekparolas.

— Nia patrineto dormas. Ni forlasu niajn paĝojn kaj iru al Judito! Ni rakontos al ŝi fabelojn, kiujn ŝi tre ŝatas, por ke ŝi povu pli dolĉe sonĝi, nia bonkora belulino.

— Jes, jes! konsentas la aliaj unuvoĉe. Ni iru!

La literoj pligrandiĝas kaj, malsupren grimpante kaj paŝetante, ili direktas sian iron al la sonĝanta dormulino.

— Kion vi serĉas tie ĉi? subite demandas granda cifero per ordona voĉo.

— Ni volas viziti Juditon! Sed kiu vi estas?

— La cifero tri de la murhorloĝo. Al ĉiu el ni estas permesite promeni laŭvice ĉiunokte po unu horo sur la planko de tiu ĉi ĉambro por gardi Juditon.

— Dume ni estas al ŝi rakontontaj belegajn fabelojn.

La literojn svarme alvenadas, kiel formikoj el sia loĝejo, tutplene superŝutante kaj okupante la litkovraĵon.

★

## II. — *La literoj parolas.*

— Judito, ĉu vi konas nin?

— Jes, vi estas al mi konataj, karaj literoj, el mia fabellibro!

— Ĉu vi volas aŭskulti fabelojn?

— Tre volonte! Sed kie ili estas?

— Ĉu vi ne scias, amata ĉarmulino, kie estas la patrujo de la fabeloj? Aŭskultu do! Tie malproksime, en la lando de la fantazio kaj eterna sonĝo ili loĝas, la belegaj knabinoj; oni nomas ilin fabeloj. Ĉiunokte, kiam la tero trankviliĝas kaj la bonaj infanoj ekdormas, dissendas ilia juna potenca reĝino ĉarmegajn fabelojn al tiuj, kiuj ilin amas, por plidolĉigi iliajn sonĝojn.

— Mi tre sopiras al tiea lando, por vidi la mildan diinon, la belan reĝinon de la fabeloj.

— Nur en sonĝo oni povas vidi ŝin. Ŝia vizaĝo brilas, kiel la ridetanta sunlumo.

Sur oraj aerinsuloj kun mirindaj grotoj kaj sanktaj fontetoj staras kristalaj palacoj, meze de ensorĉitaj arbaretoj: ŝia loĝejo. Nur feinoj kaj niksinoj, nimf-

oj kaj elfknabinoj, gnomoj kaj koboldoj estas iliaj gastoj.

Sur paradizaj valoj kun florantaj herbejoj kaj bluaj lagetoj ili promenas, kantante kaj dancante en arĝenta lunlumo, envolvitaj en travidebla vualo de blankaj nebuletoj.

En la lando de la fabeloj la malbono kaj la morto estas nekonataj. Tie en la alta templo de la sankta fantazio regas senmorteco, pura gajeco, nura boneco. La tuta naturo tie dormas kaj sonĝas pri misteraj sekretoj de la tera patrino.

★

## III. — *La fabelo venis.*

Granda rajdisto, kiu kune kun literoj estis forlasinta la unuan, multkoloran ilustraĵon de la fabellibro, aperis, kriante per forta, triumfa voĉo :

— Ŝi jam estas venanta, la bela fabelo ! Jen ŝia sekvantaro ! foriru, literoj !

La stansoldatoj, kuŝantaj en granda, ligna skatolo, apartenantaj al la frato de la dormanta knabino, vekiĝis kaj, elsaltante, ili baldaŭ staris en la vico

antaŭ la nobla rajdisto, por fari la ordon.

La dormoĉambro plilongiĝis, plilarĝiĝis ; stranga lumo ekbriligis la ĉambron. Tintiloj kaj sonoriloj eksonis. Malgrandaj gnomoj, apogante sin sur bastonetoj, alvenadis. Babilante kaj ridetante ili ekĉirkaŭstaris la liton de Judito. Ilin sekvis mentonbarbaj koboldoj kun trumpetoj kaj lanternoj.

Starante spalire kun la stansoldatoj, subite ĉiuj eksilentis. Jen jam estis la ĉarmega knabino, kun ora diademo en nigraj harbukloj. Ŝi estis la fabelo, unu el la multnombraj servistinoj de la fabelreĝino. Beletaj elfinoj ĉirkaŭiris ŝin, portantaj plurkolorajn, bonodorajn bukedojn. La ĉambrego fariĝis paradiza, belegaspekta ĝardeno.

★

## IV. — *La balo.*

Alpaŝinte al la lito de Judito, la fabelo milde kaj dolĉe enrigardis ŝiajn sonĝetantajn okuletojn. Ektuŝinte ŝin,

ŝi karesis ŝiajn vangojn per rozkolora, parfumplena mano, kaj diris:

— Judito, mi venis! Vi volis vidi kaj aŭskulti fabelon! Ni nun volas amuzi vin, karulino. Hodiaŭan nokton ni solenos dancfeston!

La elfinoj konsentis, ĝojsaltetante. La stansoldatoj, gnomoj kaj koboldoj kaŭrekuŝigis sin, malplenigante la dancejon.

La klavaro de la fortepiano belege eksonoris. Delikataj knabinetoj, kurveninte el ĝi, sidigis sin sur la plankon. Akompanante sin per dolĉaj kantoj, ili ludis diajn melodiojn sur siaj instrumentoj.

La elfinoj komencis rondodancon; en ilia mezo aerdancis, kiel orumita nebuleto, la ĉarmega fabelo.

Nun aperis strangestaĵoj: el la angulo algrimpis ĝibulo longharulo, kiu; kapturniĝante kaj saltante, amuzis la knabinon. Li fajfalvokis koboldojn, kiuj, ronddancante kaj saltetante, laŭte kantadis kaj kriadis. Judito ridis; la fabelo sidis ĉe ŝia flanko.

Jen alvenis blondhara junulo.

— Via memoro! flustris la fabelo. La frato de via animo! Loĝinte ĉe vi de

la infaneco ĝis la maljuneco kaj rakontinte al vi ĉiujn okazintaĵojn de via vivo, la memoro forlasos vin, kiam vi mortos, alflugonte kun via animo al la eterna Dio.

— Kaj ĉi tiuj knabinetoj?

— Ĉi tiuj flugestaĵoj estas viaj pensoj. Vivante kiel koloraj bildoj en via animo, ili parolas kun vi, kiam vi estas sola. Ĉi tiuj knabetoj estas amoretoj, viaj deziroj. Ĉiunokte ili kunvenas, amuzigante vin per vivaj teatraĵoj. Vi tiam vidas en viaj sonĝoj belegajn bildojn.

La homfiguraj spiritoj flugdancadis, la junulo blondharulo rakontadis ĉarmajn rakontetojn. Kiam la moviĝantaj ombrofiguroj estis malaperintaj, Judito ekvidis en siaj manoj belegan libron!

— Jen unu donaco de nia bonega reĝino: la orbindita fabellibro! Prenu ĝin: vi vidos miraklojn! Neniam vi povos trarigardi la mirigajn, parolantajn ilustraĵojn; ili estas senfinaj!

★

## V. — *La reĝa festo.*

Paradiza pejzaĝo kuŝis antaŭ ŝiaj okuloj. Larĝa, blanka strato alkondukis, tra belegaj arbaretoj, al granda palaco kun cent turoj kaj marmora ŝtuparo.

Orvestistaj kavaliroj, sekvataj de junaj, belaj paĝioj, rajdadis al la palaco. La reĝo aranĝis ĝojfeston por fari honoron al la reĝino de l' fabeloj. Ŝi mem estis promesinta veni ĉi tiun vesperon por rakonti fabelojn.

Dukoj kaj dukinoj, princoj kaj princinoj, la tuta nobelaro alvenadis grandamase en longegan kronsalonon. La reĝo sidis sur ebura trono meze de siaj korteganoj.

La mozaika planko estis kovrita per molaj, multekostaj tapiŝoj. Pezaj diamantornamitaj kandelabroj plenigis la salonon per multkolora brilo.

Kiam ĉiuj festvestitaj gesinjoroj jam sidis sur grandaj, purpuraj seĝoj, en longaj vicoj ĉe la ortapetitaj muroj, la reĝo ekparolis per afabla voĉo:

— Nobelaj gesinjoroj! Ni kunvenis al la hodiaŭa festo por aŭskulti ĉarm-

ajn fabelojn de la reĝino mem. Mi estis invitinta ĉiujn gekonatojn; espereble neniu estis forgesita.

Tiam aŭdiĝis laŭta voĉo:

— Judito mankas, la senkulpa belulino. Voku ŝin! Mi ŝin elektis princidino!

★

## VI. — *La fabelreĝino.*

Ektimigite eniris Judito la reĝan salonon vestita per luksa vestaĵo, ornamita per ora diademo. Ĉiuj gastoj ekflustris, entuziasmiĝintaj:

— Ĉarmanta knabino! Vera princidino!

La reĝa salono ekbriliĝis per fortega lumo; kantantaj paradizbirdoj enflugis, agrabla odoro plenigis la salonon, mola, dolĉa muziko eksonis. La ĉambrego aliiĝis: oni sidis en ensorĉita arbareto. Sennombraj estaĵoj aperis, beletaj sorĉistinoj superŝutis la plankon per odorantaj floroj. Sur purpuraj fungoj sidis ridantaj, kolorvestitaj koboldoj. Gnomoj kaj gnominoj ĉirkaŭsaltetadis

la surprizitajn gastojn, surgenuigante sin. Belegaj feinoj, ĉarmaj niksinoj kaj orharaj elfinoj alpaŝadis, dancante, kantante. Nebulitaj fabeloj flugpendis super la kapoj de mireganta korteganaro.

Jen aperis kvar flugetantaj cignoj kun luksa veturilo kaj ĉiela baldakeno, plena de juvelŝtonoj. Jen sidis ŝi mem, en briletanta, duondiafana vualo, tiel belega, ke la okuloj de festantoj ne povis enrigardi ŝian vizaĝon. Ĉiumomente ŝi aliiĝis — ŝi havas nekonstantan formon — kaj ĉiam ŝi fariĝis pli bela.

La melodia ario de la muziko plifortiĝis, la birdoj ĝoje flirtadis, ŝia sekvantaro kantadis. Sed kiam la fabelreĝino kun dolĉagrabla rideto ekparolis karesvoĉe, ĉiuj subite eksilentis nek aŭdebliĝis ia sono.

★

## VII. — *Kio estas fabelo?*

Ĉiu konas fabelon, mirindan rakonton, kiu amuzante nobligas la puran infanan koron kaj plidolĉigas la senkulpajn sonĝojn de revemaj knabinoj.

Belsona, kiel dia kanto, estas mia voĉo. Ĝi ekĉarmas ĉiun orelon, ĝi kortuŝas ĉiun animon, pleniganțe ĝin per eterna beleco. Miaj brilegantaj okuloj parolas pri la sankta, pura amo.

La fantazio kaj la poezio kreis mian miljaran patrujon, la sonĝon de l' homaro, en kiu oni forgesas siajn suferojn.

La fabelo rakontas pri ĉio, kio ekzistas sur la mondo. Ĉio estas ebla, ŝanĝebla. En nia lando la tuta naturo fariĝas eterna fabelrakonto.

Per brilantaj flugiloj la fabeloj migras de loko al loko. Ĉiu akceptas ilin, ĉu en la palaco, ĉu en la malriĉa dometo. Ĉiuj popoloj nin konas, adoras kaj diigas. La poetoj glorigas nin. Ĉiu generacio ĝojvenas al ni por satigi siajn sopirojn al la pura beleco. La junularo amas nin kaj sonĝas pri ni la unuajn sonĝojn.

La avino rakontas fabelojn al siaj genepoj kaj tiuj al siaj. La fabelo vivas eterne. Jarcentoj kaj jarcentoj jam estas pasintaj, sed mi ĉiam vivas, juna kaj bela, kiel la miljara floro.

Mi vidis vin kiel infanojn, mi vidos viajn pranepojn, kiel maljunulojn kaj

mi al ili rakontos novajn fabelojn. La fabelo rekondukas la homajn pensojn en la infanan junecon, kiam ĉiu travivis la plej feliĉajn tagojn de sia vivo. La infanoj tial estas miaj plej amataj gastoj.

★

## VIII. — *La bela princo.*

Estis iam bela princo — la fabelo komenciĝis kiel vera teatraĵo.

Li pripensadis ĉiam nur pri la morto, pri la tempo, kiam li kuŝos en la tombo, dum la aliaj homoj paŝados sur la mondo, kiel li nun. La suno brilos, kiel hodiaŭ, kiel hieraŭ, kiel antaŭ miljaroj.

«Jes, kiel malgrandaj kaj mallongvivaj ni estas kompare kun ĝi, kiu eklumigas kaj varmigas la teron! Komparate kun la eterneco, nia vivo estas nur unu guto en la maro. Ĉia vivo ĉi tie pasas, nur la mondo kaj la suno staras ĉiam neŝanĝeblaj!» ĝemetparolis lia koro.

Rajdante tra la kampoj, li iutage ek-

vidis antaŭ si florantan, serenaspektan knabinon. Li ektremiĝis, surprizita kaj ektimigita.

— Kara princo, ĉu vi serĉas fabelon?

— Jes, bela diino! Nia mallonga vivo ne plaĉas al mi!

— Jen la odoranta, vekiĝanta naturo, la printempa juneco kaj beleco, la dia poezio, la sankta mistero de la eterna mondfabelo! Ĉu vi ne vidas, ne aŭdas ĝin? Ĉiu vivo, ĉiu estaĵo estas po unu rakonto. Rigardu naturon kaj vi vidos kaj aŭdos fabelojn!

★

## IX. — *La himno de l' naturo.*

Liaj sentoj preskaŭ forlasis lin, la pensoj distriĝis ĉiuflanken. La oreloj aŭskultadis la dian muzikon de l' naturo, la okuloj rigardadis la miraklojn, la koro sentis nekonatan feliĉon. Li kontaktiĝis kun la sanktaj misteroj de la terpatrino.

Grandega fantomo eksaltis el la tero, altkrestante, kaj etendante la manojn al la ĉielo. La animo de l' naturo laŭt-

kantadis la himnon de la universo. Ĉio akompanis ĝin. Montoj kaj arbaroj ekbruis, valoj kaj herbejoj eksonis: la tero kantis sian matenhimnon al la Ĉiopotenculo. Neniu prezentaĵo povas esti tiel bela, neniu muziko povas soni tiel dolĉe, tiel pure. Dum tiuj momentoj la princo ekvidis la dian belecon, la novan vivon de la vekiĝanta naturo.

Jen estis ĝojplenaj, apenaŭ videblaj sorĉestaĵoj kun vivantaj trajtoj. Lumbriletante kaj dolĉkantante ili flugdancadis milope en la karesa suno kaj plenigis la superteran aerspacon, sidiĝante sur liaj ŝultroj.

Kiu ilin vidas kaj aŭdas, estas feliĉa homo. Oni nomas ilin voĉoj de Dio. La briletantaj steletokuloj kortuŝe ridetis, la infanaj buŝetoj moviĝante aŭdigis sanktan kanton, kiu unuiĝis kun glorigaj himnoj de la printempa vivo.

★

## X. — *La servistino de Dio.*

La figuro de la fantomo jam malklariĝis kaj aeriĝis, atinginte la ĉielon,

kiu montriĝis mirinde bela. La princo suprenrigardis kaj ekvidis la dolĉafablan vizaĝon de Li mem. Li falis teren senkonscie. Rekonsciiĝinte, li flustris : « Granda, majesta Vi estas, patro nia. »

Larĝa ĉielarko aperis. Belkreska knabino malsuprenpaŝetis, alparolante la princon :

« Mi estas la feliĉo. Dio faris min reĝino de l' mondo.

« La unua homparo nomis min eterna vivo. Sed kiam la prahomoj perdis tiun ĉi donacon de Dio, mi forlasis ilin. De tiam ni serĉas nin reciproke : la homo feliĉon, mi la homon.

« Mi estas la simbolo de la homa kaj surtera vivo : nun oni nomas min morto. Sed mi estas bonkorulino, liberigante la mortemulojn de ĉiu malbono. La mortdeva okulo ne povas vidi la senmortecon. Nur vi estas la elektito de Dio. Vi ne mortos, vi vivos eterne en la fabelo. »

★

## XI. — *La karmezina papilio.*

La birdoj flugetadis, ĝojkantante, la floroj movis la kapojn en printempa venteto, la papilioj flirtadis, la abeloj zumadis, la princo staris senmove.

Jen bela, ruĝa papilio; li kaptis ĝin.

— Ĉarma estaĵeto, rakontu al mi fabelon!

— Aŭskultu! Estis iam juna dancistino, tiel bela, ke eĉ la birdoj ekstaris, vidinte ŝin. Ŝi povis danci tiel ĉarme kiel la anĝeloj mem!

La papilio malaperis, belega knabino dancis en la teatro. Antaŭ la reĝo kaj liaj korteganoj ŝi saltadis tiel alte kaj facilmove, ke ŝi ŝajnis havi flugilojn. Oni kredis, ke ŝi estas vera feino.

La reĝo aranĝis grandan edziĝofeston. Sed la juna dancistino forkuris el la palaco, por vivi en la libera naturo. Vidante la flirtantajn birdojn kaj papiliojn, ŝi volis iĝi malpeza papilio, flugetante de floro a floro.

Ŝia deziro estis plenumita. Dancante kaj saltante, ŝi flugpendis en la aero kaj aliiĝis. Kiel purpura papilio ŝi komencis flirtadi, bonkore dankante al la ĉio-

potenca Dio. Ŝi ricevis, de Li la senmortecon, por ekĝojigi la naturon per sia gracia flugetado. Kiu ŝin kaptas, povas vidi la miraklon de l' naturo: la belan dancistinon.

La papilio denove aperis, briletanta en la sunlumo kiel granda perlo. Ekflugetinte, ĝi sidiĝis sin sur blankan floron.

★

## XII. — *La neĝblanka floro.*

— Ŝi iĝis senmorta! ekflustris la princo.

— Jes! komencis la floro. La vivo en la naturo ne perdiĝas! La vivo forlasas mortintan estaĵon por eniri alian. Ankaŭ via animo vivos eterne kaj la memoro pri vi restos en la fabelo!

— Ĉu tio estas vera? ekkriis la princo kisante la floron.

La floro tiumomente malaperis, la papilio diris per ridetanta voĉo:

— Vi estas feliĉa, kara princo! Vi ricevis de la floro cent jarojn da homa vivo!

KUL

— Cent jarojn ? Kiu donis al ĝi tian potencon ?

— Estis iam orfa knabo. Forpelite de la homoj, li forlasis la malbonajn vilaĝanojn, rifuĝonte en arbaron. Li ja havis neniun, kiu volus konsoli kaj satigi lin. La bestoj ne estis tiel malbonkoraj. Kunportinte al li ĉiuspecajn fruktojn, ili faris al li kuŝejon kaj ludis kun li. Sed li ploris, ne volante plu vivi kaj almozpeti. Li nur volus repagi ĉion al malbonfarantoj. Aŭdinte liajn plendojn, la feinoj plenumis lian deziron. Li fariĝis ensorĉita, blanka floro. Ĉiu malbona homo mortas, tuŝinte ĝin, sed al bonkoruloj plilongiĝas la vivo.

★

## XIII. — *La floranimoj.*

— Ĉu la floroj havas animon ? demandis la princo, ekvidinte la reaperintan floron.

— Jes ! Ĉiu estaĵo en la naturo ! Kiam la floroj dormas, la animoj forlasas ilin, vi devus iĝi tre malgranda. Prenu tiun

ĉi velkintan floron kaj enirigu vian animon!

La princo pli kaj pli malgrandiĝis, fariĝante floro. La suno subiris, la floroj ekdormis, la animoj eliris. La princo vidis sin malgranda kaj enmiksis sin inter ili.

Kunveninte sur la kampo, la animoj amuziĝis per ludo kaj dancado. Jen aperis ilia reĝino, bela kiel kristala stelo, varme salutante la princon, sian novan amikon.

— Via vivo estas plej agrabla. Ŝajnas al mi, ke mi jam estis iam floro.

— Jes, vi estis! respondis la florreĝino.

★

## XIV. — *La arbardiablo.*

Forta ventego ekblovegis — la spirego de diablo — resonante kiel fulmotondro.

« Silentu! Arbardiablo! » ekĝemegis la floranimoj.

Nigra nubego, kiel granda kovraĵo, surtegis la ĉielon. Oni ekvidis du fajrajn okulaĉojn de l' monstra giganto, kiu

duonfreneziĝante grandpaŝe flugkuris el la arbarkreskaĵo. Pezaj rosgutoj faladis de lia aĉa barbo. Grimacridetante kaj elgorĝblekante, li pelegis antaŭ si multegon da sovaĝaj hundoj kaj sangavidaj lupoj. Bruega galopado strange sonigis la teron.

« Ho-o ! Mi piedbatos la mondon ! » kriegis la malbonhumora maljunulaĉo kun, dislarĝigita buŝo en granda kolerekflamo. Malbondezirege li minacis, manegsvingante kaj malantaŭen klinante la kapon.

Ĉi tiu grandegulo estis iam drinkulo, brutulo, kiu per helpo de la diablo mem faradis dum sia tuta vivo nur malbonaĵojn. Ne zorginte pri sia almozpetanta familio, li finfine freneziĝis. Sed Dio kondamnis la ebriulon al senhalta kaj senripoza vagado. Lia animo neniam povos vidi la ĉielon.

Tiel rapide, kiel li venis, li malaperis.

★

## XV. — *La malica sorĉistino.*

La naturo eksenmoviĝis, la princo diris:

— Mi vidas, ke ekzistas ankoraŭ multe da malbonaj homoj sur tiu ĉi mondo.

— Jes! La fabeloj tre ofte parolas pri ili.

Vivas iam malbonkora maljunulino, kiu malamis la mondon. Ŝi estis tiel potenca, ke eĉ spiritoj obeis ŝin.

Por mortigi kiel eble plej multe da homoj, ŝi faris ensorĉitan, belegan arbareton, el kiu neniu plu povis eliri. Ĉiu estis dediĉita al la neevitebla morto, ĉar la okuloj de la fikse rigardanta maljunulino lin tuj aliformigis en ŝtonon. Nur teruraj, senvivaspektaj statuoj staris tie, en la reĝolando de la morto.

Iam, deiris en tiun arbareton la juna reĝidino mem kaj fariĝis ŝtono. La sovaĝa sorĉistino malafablamiene ekridaĉis, kontentege kaj ekĝojigite enrigardante la noblan viktimon.

Senlima timo kaptis la urbanojn; neniu kuraĝis forlasi la domon. La

malfeliĉa reĝo sidis pala kaj senmova sur sia trono. Liaj haroj griziĝis pro malĝojo.

★

## XVI. — *La nobla kavaliro.*

Tiam eniris bela kavaliro, promesante, ke li estas mortigonta la maljunan sorĉistinon.

La reĝo diris : « Mi donacas al vi tri kastelojn, sed, se mia filino revenos viva, ŝi estiĝu via edzino ! »

Preninte kun si ĉashundon, pafarkon kaj tranĉilon, la kuraĝa junulo eniris la mirindan arbareton. Ekrigardinte belan statuon, li ektremiĝis ekkolerigita : ankaŭ la reĝidino ŝtoniĝis !

La hundo maltrankviliĝis. Jen almarŝis abomena virinaĉo kaj ekstaris antaŭ la reĝidino, ridaĉrigardante la la ŝtonigitan knabinon.

La besto sin ĵetis al la malbela virino, disŝirante ŝian vestaĵon. Sed ŝi ridetis raŭkvoĉe : « Ho, hundaĉo ! Kion vi volas ? » La brava besto jam estis rigida, ŝtonigita.

La luno eklumis, la abomena vizaĝo de l' sorĉistino ekvidiĝis. La kavaliro tiumomente jam kaptis singardeme sian pafarkon : la sago bonege trafis la bruston de l' maljunulino. Mallaŭte ekkriante, ŝi renversiĝinte mortfalis teren. Ŝia koro ne batis plu.

Alproksimiĝinte, la junulo detranĉis la aĉan kapon. Fortega tondro eksonis, la arbareto malaperis, la statuoj ekviviĝis. Dankeme salutante sian savinton, la reviviĝintoj akompanis lin al la urbo. La feliĉa, kuraĝa kavaliro festis kun la bela reĝidino grandan edziĝofeston.

★

## XVII. — *La reĝidino de la birdoj.*

El la sango de la mortigita sorĉistino elkreskis belega knabino. Oni nomis ŝin reĝidino de la birdoj. Ŝiaj birdoj kantadis per homa voĉo tiel ĉarmajn melodiojn, ke oni povis forgesi la tutan mondon.

Belegaj princidinoj, nobelaj kavaliroj estis bonvole gastigitaj en ŝia kastelo.

Sed ĉiutage malaperis po unu plej bela knabino kaj nenie oni povis trovi ŝin. Volante esti la plej bela, la kruela gastigantino aliformigis ĉiam po unu knabinon en beletan birdeton.

Kaptinte unu birdon, unu kuraĝa kavaliro eksciiĝis pri la sekreto de la mistera malaperado. Ŝi posedis oran ringon, pere de kiu ĉiu ektuŝito laŭ ŝia volo aliformiĝis.

Nokte la kaptita birdo revenis al la kavaliro, alportinte la ringon. La venontan tagon li vizitis la kruelulinon. Malĝojege ŝi sidis en sia parko: ŝi ne plu havis la sorĉantan ringon. La kavaliro prenis la paliĝintan reĝidinon je la mano, akre enrigardante ŝiajn okulojn. Ŝi fariĝis birdo, kiun li enkaĝigis.

Ricevinte sian antaŭan formon, la knabinoj dankis al li pro la savo. La kavaliro portis la birdon hejmen. La tuta lando gloris lin. Ĵetinte la ringon en riveron, li estiĝis princo kaj edziĝis kun la plej bela princidino. La reĝidino de la birdoj kantis tiam vemalgajajn melodiojn. Ŝi fariĝis malbelkanta korniko.

★

## XVIII. — *La paradizbirdo.*

« Aŭskultu! Jen kantas la paradizbirdo. » Dolĉa birdkanto eksonis: dia lulkanto, kiu ensonĝigas ĉiun homon en centjaran sonĝon. La pura, belsona voĉo resonis en la trankvila nokto, kiel anĝela sonorilo sur la ĉielo. La birdo kantis pri la ĉiela beleco, pri la eterna harmonio de la universo. Dio lasis al ĝi la ĉarmegan voĉon, kiam ĝi iĝis birdo el bonkora, mortinta kantisto.

Kiam li kantis, akompanante sin per mistertona harpo, ĉiu forgesis sian vivon, sonĝante en paradiza kantmelodio.

Mortonte li kantis kortuŝantan kanton pri la morto de l' naturo. Ĉiuj birdoj ploris, aŭskultinte lin, mortantan kune kun la vintra naturo.

Donacite de Li per eterneco, li nun kiel birdo feliĉigas la homojn per sia dia voĉo. Feliĉaj estas tiuj, kiuj povas aŭskulti la centjaran, neelkanteblan lulkanton pri la eterna belega naturfabelo.

★

## XIX. — *La ĉevalbirdo.*

Vekiĝinte el centjara sonĝo, la princo malĝoje ekĝemis. La fabelo ja estas nur ŝajno, mensogo!

— Kaj tamen la vivo sen fabelo ne estus dolĉa, agrabla! diris sonorridetanta voĉo.

— Ĉu vi estas ankoraŭ tie ĉi, fabelo, bela diino?

— Jes! Sciu, ke la homa vivo estas la plej bela sonĝo de l' naturo, la plej bela fabelo de l' mondo. Sonĝu ĝin!

Li restis sola. Ĉu mi ankoraŭ sonĝas? li demandis sin. Ĉu tio ĉi, kion mi vidas, estas nur viva, sonĝa bildo?

Li ekkonis la vojon, kondukantan al la monteto, sed — lia kastelo estis ruino! Atesto pri malnovaj tempoj! Li ekploris. Ĉio pasas sur la mondo! Kiel li estis travivinta tiom da jaroj?

Jen belega ĉevalbirdo!

— Kien vi estas forfluganta, kara besto?

— Mi atendas la fabelon, por forporti ĝin en la orienton. Tie vivas belega

reĝidino. La fabeloj estas ŝiaj ĉiutagaj gastoj.

La floranta feino denove aperis; la princo genuiĝis antaŭ ŝi.

— Bona fabelo, prenu min kun vi! Mi ne povas plu vivi tie ĉi en mia ruiniĝinta kastelo, elsonĝinte la belan sonĝon, la dolĉan fabelon de mia vivo. Mi sopiras al feliĉa lando de la sonĝo, de la beleco, de la fantazio!

— Vi povas iri tien kaj iĝi senmorta. Mi ja estas via fabelo! Naskiĝinta la saman tagon, mi akompanas vin la tutan vivon. Ĉiu homo havas sian fabelon. Ni iru!

★

## XX. — *Judito vekiĝas.*

Ankaŭ Judito havas sian fabelon. Ŝi ne sciis tion ĉi. Sed la filo de l' suno, restinte vespere, kiam la sunreĝo kunvokis al ĉielo siajn filojn, ĉe la bonkora Judito, diris al ŝi ĉion, rakontante al ŝi belegajn fabelojn la tutan nokton.

Sed la sunreĝo bone sciis, ke unu radio mankis, kaj dissendis siajn multnombrajn filojn, por serĉi ĝin.

La suno jam leviĝas, ruĝkolora, kiel pura purpuro. El ĝia brila vizaĝo eliris ora araneo, komencante plekti lumantajn fadenojn, varmajn lumradiojn, sur kiuj malsuprengrimpis diverskolorigitaj paĝioj, servantoj de la ĉielreĝo.

La araneo plektas oran reton, brilantan vualon, purpuran kurtenon, por kovri la sanktecon de la dia fabelo al la realeco de la tera vivo.

Judito malfermas siajn okulojn pli kaj pli. Ŝi sentas la varmigantajn radiojn, ekbriligantajn la ĉambron. La suno kisas ŝiajn vangojn, ŝiajn okulojn, salutante ŝin: « Bonan matenon, Judito! »

Vekiĝinte, Judito ĉirkaŭrigardis ekmirigite, malĝoje flustrante:

— Kiel bela estis la nokto, kiel dolĉa la sonĝo, plena da fabeloj! Sed mi nur sonĝis!

— Jes, vi sonĝis, Judito, kaj vi povas ĝoje trasonĝi la junecon, la plej puran sonĝon de via senkulpa vivo, vian belan fabelon! diris karesvoĉe la suno kaj kisis ŝin denove. El ŝiaj okuloj ekrigardis la ĉiela filo kaj la dia patro ekridetis ankoraŭ pli agrable...

# ENHAVO


| | | Paĝo |
|---|---|---|
| I. | — Judito dormas | 3 |
| II. | — La literoj parolas | 5 |
| III. | — La fabelo venis | 6 |
| IV. | — La balo | 7 |
| V. | — La reĝa festo | 10 |
| VI. | — La fabelreĝino | 11 |
| VII. | — Kio estas fabelo ? | 12 |
| VIII. | — La bela princo | 14 |
| IX. | — La himno de l' naturo | 15 |
| X. | — La servistino de Dio | 16 |
| XI. | — La karmezina papilio | 18 |
| XII. | — La neĝblanka floro | 19 |
| XIII. | — La floranimoj | 20 |
| XIV. | — La arbardiablo | 21 |
| XV. | — La malica sorĉistino | 23 |
| XVI. | — La nobla kavaliro | 24 |
| XVII. | — La reĝidino de la birdoj | 25 |
| XVIII. | — La paradizbirdo | 27 |
| XIX. | — La ĉevalbirdo | 28 |
| XX. | — Judito vekiĝas | 29 |


BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

IMP. SOLSONA, 9, RUE HALLÉ, PARIS-14e

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
1225 I